


# Gazeto Andaluizia

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

12a Jarkolekto \*

Junio, 1995

N-ro 42



## GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal 42, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 Málaga), José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.

GRÁFICOS: Raquel MARTÍN TOVAR y fondo informático de AEU.

### ENHAVO

Efika Esperantismo /9	3
Intervjuo al membro de Humanista Partio	5
Dekalogo de la tekstoprilaboriloj	8
Komento pri la proponoj de Navareño kaj Ojer pri	
Alfabet-reformo	10
Enketo pri Pola Radio	12
Poezia Angulol	14
Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj en	
Esperanto	16
Mizero en Hispanujo, Mensogol	18
Literatura Konkurso	19
Komerca agado	20
Komputila Esperanto-Kurso	20
Sed, kio estas Esperanto?	21
Krucvortenigmo	22
Esperanto Aplikata	24

Ni provis per ĉi tiu numero de *Gazeto Andaluza* iom plibonigi la legebleco de la revuo, ne plu uzante grizaĵojn, kio ebligas nin enmeti iom pli da teksto kun iom pli da klareco.

Pri la enhavo, ne multas novaĵoj... krucvorto reaperas sur niaj paĝoj, pro la sugesto de la legantoj aperigi nun edukigajn enigmojn. Kaj ĝi revenas pli forta kaj malfacila ol iam...



## Efika Esperantismo /9

Multaj opinias, ke la enkonduko de unu sola lingvo kiel internacia uniformigos la kulturojn, kaj tial malriĉigos ilin, ĉar en la kulturo la unuformeco estas negativa faktoro. Ilia klopodado direktiĝas al la plifortigo de la etnaj minoritataj lingvoj, eĉ kontraŭante la disvastigon de la plej disvastigitaj lingvoj, tiujn akuzante pri lingva imperialismo.

Ni unue povas diri, ke renaskiĝo de minoritataj lingvoj estas retroirado al la pasinta mezepoko kaj limigo al la disvastigo de la kulturo.

La etnaj lingvoj aŭ pli precize la restaĵoj de la mezepokaj dialektoj ne ludis kiel kulturajn lingvojn. La tiama intelektularo, tiel same la ekleziuloj kiel la laikoj uzis en Eŭropo la latinan lingvon. Tiam la etnaj lingvoj aŭ dialektoj ne estis skribaj, nur estis parolataj de la plejmulto, kiuj estis analfabetoj.

Bazi la propran personecon sur etna lingva identeco ne estas kultura progreso, tute kontraŭe, revivigi pasintajn stadiojn de nescio.

La interŝanĝo de pensoj kaj scioj en la ebla plej granda kvanto da personoj kaj vasteco de teritorio vivigas la kulturon. La izoligo tiel same persona kiel en malvastaj teritorioj kreas stagnantan kulturon, voje al dekadenco.

La kulturo entute estas la heredaĵo de la tuta pasinteco kun la adicio de ĉiuj nuntempaj kulturoj kune kun la renoviĝo de la penso paralela al la kreskado de la scio kaj disfalo de eraraj konceptoj. La kulturo ne estas io stagna, ĝi evoluas.

La scienca scio estas la plej alta atingiĝo de la homa menso, estas komuna propraĵo de la homaro, kaj ĝi precipe ĝermis en Eŭropo, sendistinge de regnoj.

Certe, la scienco estas nur parto de la kulturo. La kulturo ankaŭ entenas la senton, la arton, la etikon kaj eĉ la morojn. Pri la folkloro oni povas diri, ke ĝi, kvankam ĝiaj diversaj variantoj, estas unueca, tial ke ĝi rilatas al la ĉiea eterna kvazaŭa luktado inter ambaŭ seksoj, kiu finiĝas per enamiĝo.

Kultura plialtiĝo devas konsisti en etosa kultura grundo, kiu faciligas la plenan disvolviĝon de la personeco de ĉiu homo. Estas la humana pleneco, kiu estas antidoto kontraŭ netoleremo: ĝi bremsas la agresemon de fanatikaj kredaĵoj antaŭ kiuj nesame kredas aŭ opinias.

La kulturo estas pluraleca. Pro tio ĝi ne estas unuforma. Nek la personeco de la homoj estas egalaj nek tiel same estas la moroj nek pro unuformeco oni devas forigi la etnajn lingvojn, kio ne volas diri, ke pro identeco oni dediĉu sin al ilia kresko kaj disvastigo. Estas necese, ke malgraŭ la diverseco en la personeco, en la ideoj kaj en la religioj povu esti atingita



komuna kunvivado en paco kaj ne nur en toleremo, sed en komprenemo pri nia personeca diverseco. Kunvivado, kiu nun jam estas nepre necesa, ke ĝi estu tutmonda. Tion precize, formulis Zamenhof en la "homaranismo" kaj kiel ilo de tiu interkompreniĝo li kreis la lingvon Esperanto.

La esperantismo do, ne estas speciala ideologio por solvi ĉiujn homajn kaj homarajn problemojn. Tiaj totalismaj ideologioj, naskitaj en la pasinta deknaŭa jarcento, alportis pli da sufero ol feliĉo. Nome de la frateco uzis la perforton. Nome de la libereco stablis diktaturojn. Pro ekonomia misplanado, oni ruinigis ĝin. Pri sociaj aferoj ne ekzistas unikaj veroj por solvi ĉion. La homaj kaj sociaj aferoj devas esti solvataj laŭ ili prezentiĝas, kaj por solvi ilin, estas necesa klareco kaj bonvolo, tiel same individuaj, kiel kolektivaj.

Estas certe, ke ni homoj devas kunvivi pace kaj harmonie kaj ekde nun en tutmonda skalo; kontraŭe la homaro ruiniĝos.

La latino estis la lingvo de la klerularo en la mezepoko. La franca lingvo kvazaŭ rolis kiel internacia en la pasinta deknaŭa jarcento kaj parto de la dudeka. La angla-usona lingvo hodiaŭ anstataŭis la francan en tiu internacia rolo. Sed neniu nacia lingvo, eĉ la angla ne taŭgas por disvastigi tiun etoson de kunvivado mondscale. Ili ĉiam estos reprezentantoj de iu hegemonia povo.

La paca kaj harmonia kunvivado mondskala estas la enkonduko de civilizacio neniam antaŭe spertita. Estas la kulmino de plej alta grado de kulturo kaj civilizo, unuafoje ebla en la disvolviĝo de la tuta historio. Impona tasko nur realigebla pere de la lingvo Esperanto kaj ties "interna ideo".

GIORDANO MOYA





## Intervjuo

Kiel sciata, ankaŭ Humanista Partio helpas en la disvastigo kaj aplikado de Esperanto. Tion pravas, inter alie, la deklarioj de Humanista Partio Feminista de Francio (vidu *Monate ĉe Vi*, feb. 1995) kaj tiu de Humanista Partio Feminista de Belgio (*Monate ĉe Vi*, jul. 1994). Ankaŭ la Humanisma Movado en Hispanio montras sin favora al nia internacia lingvo. Tio okazas, ekzemple, en Malago, kie Centro de Comunicación Humanista de Trinidad-Perchel tre subtenas la agadon de AEU.

Jen traduko de nia konversacio kun Hugo Rodríguez, membro de Humanisma Movado en Malago.

*Gazeto Andaluzia:* Ni deziras, ke la rilatoj inter via organizaĵo kaj la nia estu fruktodonaj. Pro tio, kaj por ke la AEUanoj konu pli bone la Humanisman Movadon, mi petas vin respondi iujn demandojn. Unuavice, ĉu vi afablas paroli pri vi mem?

Hugo Rodríguez: Jes, kompreneble. Mi estas membro de Humanisma Movado (HM). HM unuigas la humanismajn emojn klopodante reorganizi la socian bazon responde al la nuna kriza situacio kiun oni travivas ĉie.

GA: Humanisma Movado estas internacia. Tia realo bezonas taŭgan kaj efikan organizan strukturon. Kion vi rimarkus tiurilate?

HR: HM funkcias en multaj landoj, en Eŭropo, Ameriko kaj Azio. Ĝi estas kunordigata per ok datumbazoj diversfakaj kaj diverloke, kiuj estas informadaj bazoj al kiuj alvenas ajna persono kun siaj temaj proponoj. Alivorte,

estas pluraj temaj zonoj al kiuj oni alportas dokumentojn kaj tiamaniere iom post iom formiĝas, nun, ideologia respondo. Aliflanke, estas organiza strukturo, kunordigita, laŭ kiu oni laboras por pluraj kvartaloj aranĝante kion ni nomas Humanisma-Kvartala Agadplano. La celo de tiu plano estas labori de/en la kvartalo por la sano, la edukado kaj la vivkalkito. Per tiu agado oni intencas kunigi la penadon de ĉiuj organizoj de ĉiu kvartalo kaj tiun de ĉiuj volontuloj, komencante per disvastiga organo, kvartala ĵurnalo, kaj kreante la komisionojn kiuj ebligu respondi por la sano, la edukado kaj la vivkalkito. Tiu kvartala agado okazas laŭ la menciitaj fakoj, en la koncernaj landoj. Cetere, ĉi tiun movadon oni kunordigas en ĉiu sesmonata renkontiĝo, en kiu resumiĝas la dosieroj verkitaĵe je ideologia kaj organiza niveloj.

GA: Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro* de



Esperanto, humanismo estas "doktrino, serĉanta en la helenlatina civilizo la plej bonan rimedon por humanigi kaj klerigi la homaron".

Rilate tion, ĉu vi deziras aldoni ion?

HR: HM intencas repreni la humanisman sintenon kiun oni rekonas en ĝiaj historiaj kontribuadoj por la estigo de plej bona mondo. Oni povas difini tiun humanisman sintenon kiel la valoradon de la homo kiel centra valoro, oni povas difini ĝin kiel rifuzon de la perforto, kiel egalecon inter ĉiuj homoj, kiel daŭran klopodon reekzameni la akceptitajn vulgaraĵojn. Resume, ĉi tiuj estas la diversaj karakterizoj kiuj difinas la humanisman sintenon, troveblaj en multaj kulturoj. Nuntempe, mi opinias, ke plej interesas diskuti pri temoj kiel la laboro kaj la kapitalo. Estas necese studi denove tiujn, ĉar hodiaŭ koncentriĝas la monda kapitalo kaj tio senhalte malriĉigas la popolojn. La Reala Demokratio kaj la Formala Demokratio diskutendas ankaŭ, ĉar en formala demokratio la popolo sentas sin pli kaj pli senrevigita, ĉar ne partoprenas socie kaj, pro tio, ne aperas reagoj al la nuna socia maljusteco.

GA: De tempo al tempo, la popolo konscias mankon de demokratio ĉe partioj kiuj kvalifikas sin demokratiaj. Ĉu reale temas pri kontraŭdiro?

HR: Mi enkadrigus tion en la

temaron de la Reala Demokratio kaj la Formala Demokratio.

GA: Ne malofte, la popoloj ĉagreniĝas ĉar konkretaj politikistoj ne plenumas siajn promesojn. Tiurilate, kia estas la sinteno de HM?

HR: Laŭ la antaŭa argumentado, se hodiaŭ ne estas leĝo kiu ebligas senpostenigi la elektitajn kandidatojn kiam ili ne plenumas la promesojn kiujn ili eldiris okaze de la voĉdonado, ni konstato ke, en la unua tempo, la popolo, la plejmulto elektas malplimulton kaj en la dua tempo tiu malplimulto perfidas la plejmulton. Tiurilate oni ne devas miri, ke okazas ĉiuspecaj fraŭdoj.

GA: Bonvolu pliklarigi, se eble, la solvon proponitan de HM.

HR: Ni konstato, ke ununura ebleco ŝanĝi tiun situacion devos fondi el la socia bazo. Alivorte, se la socia bazo ne organizas sin, se la socio ne reorganizas sin kaj la decidpovo ne apartenas denove al la najbaro, la koruptoj kaj la maljustaĵoj pliiĝos, ĉar neniu disponos decidpovon por malebligi tiun realon. Do, se tio okazas, kaj se la ŝanĝebleco alvenas necese nur ĉiun kvaran jaron, evidentas granda manko de proporcio.

GA: Kion vi opinias pri la nunaj verdiktoj?

HR: Pri tio, nur unu rimarkon. Hodiaŭ mem, la televido informis, ke oni liberigis s-ron Mario Conde kaj s-ron Romání kontraŭ garantio



de 300 milionoj de pesetoj. Evidentas, ke tia situacio de enketa malliberigo ne estas ebla al ajna persono. Do se tio estas fakto, tio pravigas la neceson redoni la decidpovon al la najbaro, al la popolo, por ke tio ne pluestu.

GA: Resti senlabore konsistigas teruran problemon por la socio, la familio kaj la senlaborulo mem.

HR: Jes; tiel estu, ke ni povu diri, ke Malago ŝanĝas ĉi tiun malkontentigan situacion. Estus necese lokigi ĉiun problemon laŭ ĝia graveco ene de la serio de valoroj. Se ni povus organizi la socian bazon, se la najbaro organizus sin, ni konstatus, ke la ĉefa problemo de nia urbo estas la senlaboreco, kaj ni devus solvi unuavice ĝin. Tio, kompreneble, enkadre de la temaro pri sano, instruado kaj vivkalkito.

GA: Bedaŭrinde, en nia socio abundas teroristoj, krimuloj kaj seksperfortuloj. Pri tio kaj pri la agado de la polico, kion vi opinias?

HR: La polico, el nia vidpunkto, estas servo, polica servo, servo al la urbano aŭ vilaĝano. Tio nepras. Se la polica servo

funkcius nur premante la homon, tio malbonigus la problemojn, anstataŭ solvi ilin. Estas necese komenci debatante en la socia bazo la hodiaŭajn problemojn de perforto. Funde temas pri la taŭgeco de la sistemo; estas necese kompreni la problemon ĝisradike. Mi opinias, ke tio deiru laŭ rekta najbara dialogo, laŭ malfermiĝo al la rekta komunikado kaj, rezulte de tio, oni devos alfronti kuraĝe ĉiujn problemojn de la kvartalo. Tiurilate, la kvartala forumo estus grava alportaĵo. La ŝanĝo estas ĉe niaj manoj, ne ĉe tiuj de la superregantoj.

GA: Dankon, s-ro Rodríguez. Niajn plej bonajn dezirojn al vi kaj al HM.

□



Bonvolu  
kunlabori  
plibonigi

*Gazeto Andaluzian*

Sendu vian kontribuon  
(artikolon, leteron,  
reagon, desegnon,  
ktp.) al

AEU, p.k. 864,  
29080 Malago



## Dekalogo de la tekstoprilaboriloj

Pli kaj pli da personoj uzas ĉiutage komputilojn, anstataŭ skribmaŝino, plejofte simple por prilabori tekstojn. Tamen, komputilo estas kompleksa maŝino, kaj oni ne ĉiam ricevas helpon rilate ĝian uzon. Tial, jen iuj simplaj konsiloj, kiuj utilis por ĉiu maŝino kaj programo, kaj helpos vin tajpi pli allogajn tekstojn.

1. Kio estas tekstprilaborilo (TPL-o)? Por kio ĝi utilis?

TPL-o estas programo, per kiu oni povas "tajpi" tekstojn per komputilo. Tamen, eĉ la plej simpla TPL-o havas multegajn avantaĝojn super skribmaŝinojn. Ekzemple, la eblecon korekti erarojn sen retajpi ĉion (aŭ simple pli(mal)longigi la tekston laŭvole), enmeti desegnojn, uzi plurajn litertipojn (*fontojn*)... Oni povas tajpi la tekston per unu komputilo, endiskigi ĝin kaj uzi printilon alie ajn: hejme aŭ en profesia presejo.

2. Ne premu la *Intro*-klavon (ankaŭ nomita *Enter*, *Return* aŭ tutsimple ↵) por fini linion; nur por fini paragrafon. Se oni premas ↵-klavon, oni ne povas profiti de la multaj avantaĝoj rilate paragrafojn (ekzemple, la dekstron de la paragrafo ne povos esti ĝustigita kiel, ekzemple, ĉi tiun artikolon).

3. Ne tajpu majusklan "i" anstataŭ la nombro "1", nek

majusklan "o" anstataŭ nombro "0"; komputile, ili ne samas (l-1; O-0). Same, ne uzu du streketojn (- -) anstataŭ strekon (-). Tamen, ĉi tio ofte estas malfacila, ĉar klavaroj ne havas klavon por tiu signo; per *Windows*-programoj oni devas, premante la maldekstran klavon *Alt*, tajpi sur la nombr-bloko la nombron 0151; kaj aliaj programoj havas aliajn metodojn.

4. Ne estas rekomendinde substreki por elstarigi vortojn; estas pli bonaspekta grasigi (uzi literojn pli nigrajn), *kursivigi*, UZI MAJUSKLETOJN aŭ ŝanĝi la litertipon.

5. Oni povas ĝustigi la tekston ambaŭflanke: t.e., oni igos, ke la vortoj ampleksu ĝuste ĝis la dekstra margeno, en ĉiu linio escepte la lasta de ĉiu paragrafo (ekzemplo, ĉi tiu artikolo). La aspekto estas multe pli bona (ju pli mallarĝa la teksto, des pli bona la







aspekto). La komputilo sukcesas tion fari metante pliajn spacojn inter vortoj. Ju pli da vortoj per liniojdes pli bona la rezulto.

6. Ĉiam enmetu malplenan spacon *post* ortografa signo, krom komencaj signoj !"¿ ktp. Se oni ne tajpas tiel, la komputilo konsideros du vortojn kvazaŭ ili estus unu;rezulte ĝi tro separos iujn, kaj aliaj restos kunaj. Ekzemple, supre vi legos *unu;rezulte* (du vortojn) se la komputilo opinias ilin kvazaŭ unu.

7. Ne uzu tro da litertipojn en la sama dokumento; kutime, profesiaj revuoj uzas du: unu por la titoloj, kaj alia por la teksto.

8. Estas pli praktike unue tajpi la tekston, kaj poste korekti (kaj la ortografion (uzante, se via TPL-o disponas pri ĝi, la ortografi-helpilon) kaj la formaton. Se la TPL-o estas bona, ĝi havos eĉ sinonim-vortaron.

9. Se oni volas centriĝi tekston, oni nepre ne uzu la spac-klavon; ĉiu TPL-o havas eblecon centriĝi per iu komando. Oni same agu, se oni deziras tabelon. Kial? Ĉar se oni uzas spacojn kaj poste oni ŝanĝos la liter-tipon (aŭ -- larĝecon, aŭ la margĝenojn aŭ alian detalon), la formato ne plu taŭgos; kontraŭe, se oni uzis la komandojn, la komputile denove reformatigos ĉion taŭge.


10. Fine, du bonaj kutimoj:

a) ĉiam havu sekurec-

kopion, kaj de viaj programoj, kaj de la tekstoj jam tajpitaj; tiel oni ne perdos la laboron jam faritan se oni akcidente forviŝos dosierojn;

b) ĉiam, ĉiam kontrolu la diskojn de aliuloj antaŭ uzi ilin, serĉante virusojn (pri tio, legu en *Gazeto Andaluza* ...).

J.F.MARTÍN



En nia bulteno *Monate ĉe Vi* vi povis legi pri la bultenejo *Gaia*, kie, pere de komputilo kaj modemo, oni povas kontakti komputiluzantojn rilate ĉiujn temojn kaj ankaŭ Esperanton (ili havas nune 101 dosierojn rilatajn). Tamen, ni forgesis tion plej gravan: ilian telefonnumeron: 94-4730465; de 2400 ĝis 28800 baŭdoj; Fidonet-adreso: 2:344/27.      □



## Lingva Angulo

### KOMENTO PRI LA PROPONOJ DE NAVAREÑO KAJ OJER PRI ALFABET-REFORMO

Kiam mi ricevis vian peton, mallonge komenti pri la diritaj proponoj, mi estis verkanta longan artikolon kun titolo *El tiom da proponoj pri modifoj kaj reformoj, ĉu kio bonas por la lingvo, kio bonas nur por la fajro?* La tuton mi jam sendis al nia ĉefredaktoro de *Boletín* de HEF, por la kazo, ke li opinios utila ĝin publikigi (kion mi dubas, ĉar pro sia naturo mem ĝi estas tro longa skribaĵo... kaj teda).

En la parto de tiu artikolo temanta pri la proponoj reformi nian alfabeton, mi sistemige enlistigis per dupaĝa tabelo tiujn ne malpli ol 22 proponoj! pri kiuj mi iel-iom scias (kaj certe pluraj aliaj ekzistas, eble eĉ multaj, ĉar ja ĉiu ajn el ni povus, se nur li tion volus, pliŝveligi tian monstran tabelon per unu, du, aŭ eĉ pluraj, same kapricaj proponoj).

Kompreneble, en tiu listo aperas la du proponoj faritaj de Navareño (la unua, en 1992 en "Boletín" kaj de li jam tuj poste tute forlasita, kaj la dua, pri kiu li de tiam pledas), kiel ankaŭ la propono de Ojer (kiun li prezentis al ni en nia Malaga Kongreso, 1994).

La ĉapelitaj literoj de la Esperanta alfabeto estas la unua

lingvero pri kiu tuj ŝprucas demandoj, duboj kaj proponoj ĝin reformi.

Por defendo de tiuj specialaj literoj ekzistas pluraj argumentoj:

—Per ili oni povas pli bone respeguli la etimologion skriban kaj/aŭ prononcan de la vortoj. Por ekzemplo, *ĝardeno* pli malpli bone memorigas per sia skribo la anglan *garden*, germanan *Garten*, italan *giardino* kaj prononce la italan *giardino* kaj iel ankaŭ la franca *jardin*.

—La baza latina alfabeto ne havas sufiĉe da literoj por ĉiuj sonoj uzataj en Esperanto kaj en multaj aliaj lingvoj, kaj tiel Esperanto uzu rimedojn analogajn al tiuj de la ceteraj lingvoj, t.e., jen per konsonantkombinoj por montri al tiuj aldonaj sonoj (do paralele al alilingvaj *ch, ll, rr, sh, sc, nh, lh, sch, tsch, sz* ktp), aŭ per aldonado de helpaj signetoj al la bazaj literoj (do paralele al alilingvaj *ñ, ç, é, á, æ, ß, ý, ø, ã...*). Kaj ja por tio prefere unu sola litero kun aldona signo *ĉ ĝ ŭ...* ol literkombino aŭ digramoj *ch, gh, hh...* (pri tio konsentas ankaŭ ĉiuj fonetistoj).

Vero estas, tamen, ke ekzisto de tiaj specialaj literoj tre malhelpis



kaj eĉ nun ankoraŭ parte malhelpas publikigadon de verkoj en Esperanto. Zamenhof ne nur estis plene konscia pri la malfacilaĵoj ŝprucontaj el la specialaj E literoj, sed pri tio li eĉ jam dekomence havis propran sperton, ĉar por la unua eldono de lia *Unua Libro* la presejo ja devis fandigi tiujn tute novajn tipojn, kaj tio kompreneble altigis la eldonkostojn. Sed kvankam Zamenhof disponis nur tre malgrandan kapitalon por la eldono, li estis kaj restis firme konvinkita, ke tiuj specialaj literoj estas la plej bona ebla solvo en la kadro de la optimuma kompromiso inter multaj kontraŭantaj kondiĉoj kiujn taŭga interlingvo devas kontentigi.

Per studo de la kompara jam dirita tabelo, ĉiu povos konstati, ke la unua propono de Navareño konsistas el nura variaĵo de la proponoj aperintaj ĉirkaŭ Ido (ĉ. la jaro 1907), kaj ke lia dua estas nura variaĵo de proponoj aperintaj parte ĉ. 1910 kaj parte ĉ. 1950. Kaj la kerno de la propono de Ojer estas, siavice, nura variaĵo de la dua propono de Navareño (nome, pri interŝanĝo de la roloj de la literoj "j" kaj "y", plus alia minora afereto); aldone kaj sendepende de tio, Ojer proponas ŝanĝon de tiuj vortoradikoj, kiujn li ial opinias netaŭgaj.

Nu, ni povas jam nun veni al opinioj kaj juĝoj:

—Jam de unu centjaro la E-uzantoj disponas du oficialajn manierojn prezenti la alfabeton: Tiun principan per la ĉapelaj literoj ĉ, ĝ, ..., ŭ, kaj tiun surogatan per h-digramoj ch, gh, ..., u.

—Tiuj lingvouzantoj tute ne volas uzi la rajton, skribi per la surogata alfabeto, sed nur per tiu principa. Kaj des malpli ili volus pri aliaj alfabetoj, kiuj siavice nur surogatus al tiu dirita surogato.

—La dirita monstra tabelo klare pruvas jenajn du aferojn: (a) Munti tiajn proponojn estas triviala afero, ne postulantanta grandan penon, tempokvanton aŭ genion. (b) Ĉiuj tiaj proponoj estas klare malsuperaj, foje tre malsuperaj, al niaj du oficialaj skribmanieroj (kaj iuj el ili ja estas nuraj absurdaĵoj).

—Do, kiu ne volas pri la ĉapeluloj, tiu agos saĝe nur se li uzas h-digramojn, krome eventuale admonadas nin same fari, kaj krome kaj ĉefe ĉesas pliŝveligi la monstran tabelon.

ANTONIO ALONSO NÚÑEZ.

Nia samideano Alonso Núñez sendis la artikolon kun peto, ne ŝanĝi la interpunkciajn signojn, kiujn li uzis iom hispanece.

Reagoj bonvenaj!

# POLA RADIO

ESPERANTO-REDAKCIO  
00-977 VARSOVIO  
Poŝtkesto 46, Pollando

## Estimata Aŭskultanto!

Sekvante la ekzemplon de "Monato" kaj de la revuo "Esperanto" ni decidis fari enketaĵon, por ekscii la preferojn de niaj aŭskultantoj kaj pli bone informiĝi pri la postuloj kaj atendoj viaflanke. Tiamaniere ni volas plibonigi nian ĝeneralan programon.

Do, se vi volas helpi nin, bonvolu respondi al laŭeble ĉiuj demandoj de nia enketo. Pri la demando n-ro 4 laŭbezone vi povas skribi pli vastan opini-prezenton sur aparta paperfolio. La respondo al ĉi tiu demando povas esti kelkfraza aŭ pli ampleksa, tio dependas nur de via bonvolemo kaj disponebla tempo. La enketo estas *anonima* kaj tial vi ne nepre devas mencii vian nomon. Sed, se vi dezirus partopreni la lotadon de objektaj premioj kaj memorajoj speciale eldonitaj okaze de la 70-jariĝo de Pola Radio, tiam en la rubriko n-ro 10 vi devus klare skribi vian adreson.

Krome tiuj personoj, kiuj skribos sian adreson ricevos hejmen - en pli posta periodo (post la prilaboro kaj analizo de la enketo) - 4-paĝan preparolon de la enketo. Ni ankaŭ sendos ĝin al E-gazetoj, sed ni ne povas garantii, kiuj el ili aperigos ĝin.

Por plenigi la nunan enketilon oni devas signi per X la elektitan de vi kvadraton. Ekz.:

3. Iu demando..... 3.  ktp.

Se iu nepre deziras, tiu povas entute forlasi tiun aŭ tiun demandon, sed tio malfaciligos al ni kolekti plenan bildon pri la aŭskultantaro.

En la rubriko 3 troviĝas kelkaj elekteblaj respondoj kaj vi povas signi per X pli ol unu (laŭ via bontrovo, konforme al la vero).

Ne miru, ke en la rubriko 9 ni petas, ke - se vi nun estas pensiulo - vi tamen klare menciu vian iaman profesion. Ja pensiulo ankaŭ iam estis instruisto, laboristo aŭ aliprofesiulo. Se oni ne havis aŭ ne praktikis iun konkretan profesion, tio ekz. povas koncerni virinojn, oni indiku "hejmmastrino", eventuale, se hejmmastrino havis profesion, sed ne praktikis ĝin, nomu ĝin en krampoj.

La plenigitan enketilon resendu al ni kiel eble plej rapide ĝis la 30-a de Junio 1995, sed ne atendu ĝis junio, prefere tuj plenigu ĝin kaj resendu al ni.

Se vi bezonas pli da enketiloj por viaj geamikoj-aŭskultantoj, skribu kaj ni tuj sendos ilin, se vi ankaŭ mem povas fari enketilojn per kopiado.

Ni antaŭdankas pro via helpo kaj via kunlaboro. Kore salutas vin - en la nomo de ĉiuj redaktoroj -

ESTRO DE LA REDAKCIO

(Andrzej Pettyn)

Varsovio, en maro 1995.

## La nunaj frekvencoj

La Esperanto-elsendoj de Pola Radio estas aŭdigataj du fojojn tage: de la 26-a de marto ni uzas la jenajn frekvencojn:

15.30 h. - 31,50 m ; 41.18 m ; 41,99 m ; 48,90 m

(= 9525 kHz ; 7285 kHz ; 7145 kHz ; 6135 kHz)

22.30 h. - 48,90 m ; 49,22 m ; (= 6135 kHz ; 6095 kHz)

## La elsendoj per satelito Eutelsat

Ni refoje rememorigu, ke apud la aŭdigado de la elsendoj per la tradiciaj frekvencoj listigitaj apude, ambaŭ E-elsendoj de Pola Radio estas plue paralele aŭdigataj per la satelito Eutelsat II F - 3 - 16 gradoj de la orienta latitudo; frekvenco 11,080 GHz, polarizado horizontala (H); sonporta frekvenco 8.28 MHz.

POSTNOTO: se vi nepre deziras aŭ preferas, vi povas resendi la enketilon per fakso. Niaj fakso-numeroj: +48-2 (645-5917), +48-2 (645-5919)

<p>1. Kiom ofte vi aŭskultas la Esperanto-elsendojn de Pola Radio?*</p> <p style="text-align: center;">*Elektu unu el la variantoj!</p>	<p>1. ĉiutage 2. kelkfoje en semajno 3. kelkfoje en monato 4. unufoje en monato aŭ malpli ofte</p>	<p>1. <input type="checkbox"/> 2. <input type="checkbox"/> 3. <input type="checkbox"/> 4. <input type="checkbox"/></p>
<p>2. De kiom da tempo vi aŭskultas la E-elsendojn de Pola Radio?*</p>	<p>1. de 1 jaro aŭ malpli longe 2. de 1 jaro ĝis 3 jaroj 3. de 3 ĝis 10 jaroj 4. de pli ol 10 jaroj</p>	<p>1. <input type="checkbox"/> 2. <input type="checkbox"/> 3. <input type="checkbox"/> 4. <input type="checkbox"/></p>
<p>3. Pro kio vi aŭskultas la E-elsendojn de Pola Radio? Priskribu la kialojn de la aŭskultado</p> <p>*** Prezentu vian opinion sufiĉe amplekse. Laŭbezone konkrtingu temojn, kiuj ĝis nun mankis aŭ pri kiuj vi volus aŭdi en estonteco, ktp.</p>	<p>1. por ĝenerale informiĝi 2. por informiĝi pri Pollando 3. por informiĝi pri la transformiĝoj en Pollando kaj en aliaj landoj de la orienta Eŭropo 4. por informiĝi pri kultura vivo 5. por informiĝi pri la E-movado ĝenerale kaj tutspeciale en la lulilo de E-o - Pollando 6. por havi ĉiutagan parolkontaktan kun la lingvo Esperanto</p>	<p>1. <input type="checkbox"/> 2. <input type="checkbox"/> 3. <input type="checkbox"/> 4. <input type="checkbox"/> 5. <input type="checkbox"/> 6. <input type="checkbox"/></p>
<p>4. Kio en la E-elsendoj plaĉas aŭ malplaĉas al vi? (laŭbezone skribu pli amplekse sur aldona paperfolio aŭ skribu tre koncize en la apuda rubriko, se sufiĉos la disponebla loko)***</p>		
<p>5. Kia estas la aŭdebleco de la E-elsendoj de Pola Radio en via urbo/regiono?</p>	<p>1. bona 2. kontentiga 3. ŝanĝiĝanta jen bona jen malbona 4. malbona</p>	<p>1. <input type="checkbox"/> 2. <input type="checkbox"/> 3. <input type="checkbox"/> 4. <input type="checkbox"/></p>
<p>6. Sekso</p>	<p>1. viro 2. virino</p>	<p>1. <input type="checkbox"/> 2. <input type="checkbox"/></p>
<p>7. Aĝo</p>	<p>1. ĝis 19 jaroj 2. 20-30 jaroj 3. 30-40 jaroj 4. 40-50 jaroj 5. 50 kaj pli da jaroj</p>	<p>1. <input type="checkbox"/> 2. <input type="checkbox"/> 3. <input type="checkbox"/> 4. <input type="checkbox"/> 5. <input type="checkbox"/></p>
<p>8. Instruiteco/edukiteco</p>	<p>1. elementa 2. mezgrada 3. supera</p>	<p>1. <input type="checkbox"/> 2. <input type="checkbox"/> 3. <input type="checkbox"/></p>
<p>9. profesio (se vi estas pensiulo, en krampoj skribu la nomon de via iama profesio)</p>	<p>Nomo de iama profesio: Pensiul(in)o -</p>	<p>JES/NE</p>
<p>10. Nomo de mia loĝ-lando: _____ Sube nomo kaj adreso (ne devigaj):</p>	<p>1. urbo 2. vilaĝo aŭ apudurba loĝ-kolonio, loĝvilaĝo</p>	<p>1. <input type="checkbox"/> 2. <input type="checkbox"/></p>



## Poezia Angulo

ĜIS CENT KVINDEK!

*Profesor Bogomolec, en Kiev, eltrovis serumon por plilongigi la homan vivon ĝis cent kvindek jaroj... (el ĵurnaloj)*

Ĉu vi aŭdis la novaĵon?  
 Profesor' Bogomolec'  
 Plilongigas nun la aĝon  
 De la tuta homa spec'.  
 Nun ni vivos -kiel karpoj-  
 Ĝis la cent kvindeka jar'!  
 Pli ol iam, pro la barboj,  
 Estos regno de ... barbar'!

Per du gramoj da serumo  
 Plilongiĝos nia viv'  
 Ĝis plejebla maksimumo,  
 Kia bela perspektiv'!  
 Estas ĝoje, dum la nuno  
 Pensi: Kelkaj inter ni  
 Eble vivos ĝis ĉe U.N.O.  
 Fine regos harmoni'!



Restas ankaŭ la espero,  
 Ke en nia propra land'  
 Ni revidos kun butero  
 Foje pecon de viand'!  
 Tiam super la telero  
 Ni hezite klinos nin  
 Kaj demandas al kelnero:  
 «... Kiel oni manĝas ĝin?»

Kia ĝojo, kiam morgaŭ  
 Progresema flugmotor'  
 Nin kondukos ĝis Novjork' aŭ  
 L'Ekvator' en duonhor'!  
 Sed ni pli kaj pli rapidos,  
 Tiel fulme, ho delir',  
 Ke ni ree hejme sidos  
 ... lom antaŭ la forir'!



Plue, dank' al la ĥemio  
 Ĉio povos tuj, laŭ vol',  
 Ŝrumpi ĝis la dimensio  
 Mikroskopa de pilol'.  
 Certe vi, antaŭ ol morti,  
 Vidos, kiel laca hom'  
 Povos mem sin hejporti  
 En la poŝ' de l' pantalon'!

Sed mi fidas nur duone  
 Al genio de l' homar':  
 Ĝi kutimas tro sindone  
 Okupiĝi pri misfar'.  
 Kion saĝe la tekniko  
 Nun proponas al konsum',  
 Venos morgaŭ el fabriko,  
 Sub la signo de Bumm-Bumm!

Se mi ĉion konsideras,  
 Ho sinjoro profesor',  
 Vere, morti mi preferas,  
 Kiam venos mia hor'.  
 Kial vivon plilongigi,  
 Kiu estas duon-tomb',  
 Se minacas nin mortigi  
 Morgaŭ jam atoma bomb'!

*Raymond SCHWARTZ, franco (1894-1973). Kontribuis precipe al Literatura mondo kaj al La nica literatura revuo. Fondinto de la esperantista kabaredo La verda kato kaj poste de Tri koboldoj. Humuristo kaj satiristo. Verkoj: Verdkata testamento, Prozo ridetanta, La stranga butikoj, La ĝoja podio, Kiel akvo de l' rivero, Vole... novele, kaj Kun siaspeca spico.*



## Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj en Esperanto

De antaŭ pluraj jaroj Antonio Alonso Núñez klopodas pri la okazigo de preuniversitataj somerkursoj je internacia nivelo. Tiucele li prezentis la projekton al la Universitato de Santiago de Compostela kiu lastatempe respondis jese. Por ke ĉiuj legantoj de *Gazeto Andaluza* komprenu la nunan situacion de la afero, jen resumon (verkitan de la iniciatinto) de la enhavo de kelkaj punktoj el la tuta afero:

--Dankas la alsenditan dosieron pri celo, strukturo, ĝisnunaj sortoŝanĝoj de la projekto. La Universitato principe faras sia la projekton, kaj tial ĝin gvidados.

--La kerna strukturo konsistas el eldonotaj tekstoj specife verkita en E-o por la Somerkursoj fare de internacia fakularo, kaj fakta parola instruado en klasĉambro en E-o fare de tiu sama fakularo al internacia junularo.

--Dankas la tekstojn jam alsenditajn de pluraj fakuloj, petas kaj antaŭdankas pri plua tia helpo. Kore invitas la junajn E-uzantojn partopreni la Kursojn kaj ricevi la establitan koncernan diplomon.

--La tuta projekto konsistigas klerigan taskon, sen ajna profitocelo. Antaŭdankas ĉian helpon de ĉiaj institucioj klerigaj, administraj, financaj, kiel ja ankaŭ

de E-institucioj.

--Por ke ne okazu pli da prokrastoj, endas ke jam en la tuta somero 1995 okazu la unua Kursosesio, se bezone nur laŭ modesta, prova nivelo. Pri malvolvo de la projekto zorgos la Vicrektoroj por Klerigo-Disvastigo kaj por Studentoj.

En Galegio jam de pluraj jaroj ne plu ekzistas eksplicita kontraŭstaro de la klerularoj al E-o (por kio grave rolis la altnivela plurjara informado, i.a. pere de la broŝuro *Notas e informe sobre a Lingua Internacional Esperanto*, tiam laŭdata, i.a., de Waringhien kaj de Becker). Al tio tre helpis ankaŭ en freŝaj tempoj la publikaj eldiroj ĉi-tieaj de Umberto Eco pri devoj, ke la universitato kaj politikistoj serioze atentu kaj apogu Esperanton; helpis ankaŭ la ĉi-tiea akcepto fare de PEN-klubo de sia E-sekcio, ktp. (Klara ekzemplo de tia sinteno vidiĝas en la fakto, ke oni jam nun invitas ankaŭ gravajn E-fakulojn prezenti nian lingvon kaj sintenon en granda internacia kongreso organizata de nia Universitato kaj okazonta en Santiago en 1996 pri la Babel-problemo.)

La duboj nun reduktiĝas al tio (pri kio ni eĉ debatis ankaŭ kun du anoj de la asista teamo al la





hispana ŝtata ministro pri Edukado kaj Sciencoj), ĉu la E-uzantaro disponas la internacian kapitalon homan kaj kulturan, bezonatan por kiaj ajn rigore plenkvalitaj klerigtaskoj, kiel ankaŭ pri tio, ĉu ekzistas internacia studentaro postulanta aŭ almenaŭ preta ricevi instruadon en E-o. Nu, jen ni pensas, ke per *ĉies niaj* fortostreĉoj *ni ĉiuj* baldaŭ *oficiale* pruvos ke jes, kaj ke tial ni krome starigos la firman bazon, sur kiu *ni ĉiuj* povos poste malvolvi la tre pli ambiciajn planojn, kiujn la nuna projekto pri E-Somerkursoj ĝerme enfermas en si.

En la jaroj 1990 kaj 1991 (kiam ŝajnis, ke la E-Somerkursoj tuj komenciĝos), ni dissendis du plurpaĝajn presitajn cirkulerojn pri


la projekto al ĉiuj ĉefaj Institutoj kaj organizaĵoj. Nun estas pretigata tria cirkulero, jam kun pli konkretaj detaloj.

Tamen, jam tie ĉi ni prezentas la peton pri la plej grava kaj urĝa helpo bezonata de la projekto, almenaŭ por la unua kaj eble ankaŭ dua jaro: ĉiu E-instituto (ŝtata, regiona, loka, faka, kleriga, ktp) estas petata, bonvole stŭdi la eblecon, financi al unu aŭ pluraj el siaj junaj membroj la vojaĝon kaj (malmultekostan) restadon dum 1 ĝis 4 semajnoj en nia universitato, en baldaŭ anoncota dato de ĉi-somero 1995, kaj ke pri tia provizora decido ili bonvolu informi nin.

Ĉiuj bonvolu kompreni, ke la ĉi-tieaj institucioj, almenaŭ komence, povas nur parte financi la projekton! Al ĉiuj, anticipan dankon por ĉia helpo kaj kunlaboro al *ĉies nia* projekto.

Jen la projekt-adreso: Lic. Antonio Alonso Nŭñez, Curso de Esperanto - Facultad de Filología; E-15705 Santiago de Compostela (Hispanio). Telefono kaj faksilo: +(9)81 59 80 05

(LAŬ *BOLETÍN*, N-RO 320)





## Mizero en Hispanujo, Mensogo!

Tre ofte mi legas, aŭdas pri la ekzistanta mizero en Hispanujo, kia mensogo, patrino mia! Sendube multaj hispanoj estas nebone informitaj pri la reala situacio ekonomia ekzistanta hodiaŭ en ĉi tiu bela lando. Kaj mi tion ne asertas kaprice, mi jam bone informiĝis pri la temo; mi ne deziras fali en erarojn, nek demagoge eksponi miajn konstatatajn vidpunktojn.

Nu, jen kial kaj kiel mi fundamentas miajn asertojn. Mi legas iujn specialajn revuojn, kiuj ĉe ni estas konataj per la kromnomo *de la koro*. Kaj fakte, mi ne vidas la mizeron reflektatan en iliaj paĝoj. Male, en ili la riĉeco abundas, mi povas diri skandale; mi, ordinara homo de nia socio, neniam povas imagi la monon ekzistantan en aliaj poŝoj, en aliaj monujoj.

Papero de bona kvalito, tio jes, ĉar la enhavo rajtas uzi tiun brilan paperon, ĝi, la papero, devas esti en konsonanco kun la bonaj novaĵoj de la revuoj. Mi pensas, ke ne estas mi sola, kiu havas la privilegion legi tiujn interesajn publikigaĵojn. Ĉiam en iliaj paĝoj aperas iu altrangulo de nia socio, artistoj, toreadoroj, politikistoj, virinoj, kies tasko estas montri siajn belajn femurojn. Kaj la domoj, kion diri pri la domoj! Ekstere ili ŝajnas paradizoj, aŭ almenaŭ iu kvartalo de la paradizo. Kiaj salonoj, grandaj, ampleksaj, kia meblaro, seĝoj, foteloj, tabloj, kaj kion diri pri la ornamaĵoj, kiuj plibeligas la salonojn. Dormoĉambroj, kiaj litoj, patrino mia! luj el tiuj dormoĉambroj estas - laŭdire -modernaj, aliaj estas laŭ *stilo Ludoviko* (mi ne scias kia Ludoviko-numero ili estas), aliaj, laŭ la spertuloj, estas renesancaj...

Mizero en Hispanujo, kie estas la mizero? mensogo, duobla mensogo, en Hispanujo ne estas mizero. Ofte oni montras en tiuj revuoj la vestaĵojn de tiuj gealtranguloj, kiaj ŝrankoj plenplenaj de luksaj kostumoj, ĉu virinaj aŭ viraj, centoj da ŝuoj, allogas dormovestaĵoj, kiuj vekigas la seksan apetiton. Kaj ni ne iru al banĉambro, ĉar tie estas io, kion ĉi tiu amatora skribisto ne kapablas surpaperigi, diverskolora banejo, kaj aliaj ujoj kaj iloj harmonie plibeligas tiun specialan ĉambron. Nu, ĉu mizero en Hispanujo? Ne diru stultaĵojn!

Pri aŭtomobiloj, hundoj kaj servisto/-inoj, ni ne parolu, ii abundas kvazaŭ muŝoj en la malriĉaj hejmoj (pardonu min malriĉuloj, se estas vero, ke ekzistas malriĉaj hejmoj).

Pri manĝaĵoj, la manĝotabloj estas plenaj de riĉaj produktoj de la tero, la maro kaj eĉ de la ĉielo, mi kuraĝas diri. Kia abundeco. Multaj kaj diversaj kaj specialaj vinoj, ĉampanoj, likvoroj. Ĉu mizero en Hispanujo?

Iam mi legis, vidis fotografaĵon jenan, en unu el tiuj revuoj: je unu flanko estas sep belaj tortoj, grandaj (ilin rigardante oni malfermis mian



apetiton) kaj je la alia flanko estis sep hundoj, belaj ankaŭ grandaj, bone zorgitaj. La mastrino de la torto kaj de la hundoj, klarigis, ke tiuj tortoj estas por regali tiujn malfeliĉajn hundoj, ĉar ili ankaŭ rajtas esti feliĉaj. Dankinte la bonkorecon de tiu sinjorino, mi devas demandi min (volu ankaŭ tion demandi al vi mem), ĉu estas mizero en Hispanujo? Ne, absolute ne. Diri alion estas mensogi.

LUIS SERRANO PÉREZ

## Literatura Konkurso



La patronaro de la Fundación Esperanto decidis, en kunsido okazinta la 22an de marto 1995, organizi tradukan literaturan konkurson sub la nomo Premio Inés Gastón.

-Regularo-

1. Nur eblas konkursi per traduko(j) el novelo(j) de hispana(j) aŭtoro(j) vivanta(j) en la 20a jarcento.
  2. Ĉiu konkursanto rajtas partopreni per tri konkursaĵoj maksimume.
  3. Ĉiu konkursanto devas sendi tri ekzemplerojn de la konkursaĵo, tajpitajn laŭ duoblaj interlinioj, kun la indiko "Konkurso de Fundación Esperanto".
  4. La konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la Konkursanto, kun la originala titolo kaj la fonto el kiu oni ĉerpis la novelon. En aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto.
  5. Kune kun la Verdikto, aperos samtempe la nomoj de la juĝintoj.
  6. La dat-limo (laŭ la poŝtstampo) por sendi la konkursaĵojn estas la 30an de septembro 1995a. La Verdikto publikigĝos en la Hispana Kongreso, la 11an de novembro 1995a.
  7. Oni sendu la tekstojn al S-ro Enrique Piquero, Morería 6, 5º D, 50004 Zaragoza / Hispanio.
  8. La premio konsistas el 15000 pesetoj en libroj de la Libroservo de HEF.
  9. Fundación Esperanto rezervas al si la rajton publikigi la plej bonajn novelojn en aparta(j) volumo(j) de la libroserio *Hispana Literatura*.
- Zaragoza, la 22an de marto de 1995.

*Enrique Piquero*

Sekretario de la Fundación Esperanto kaj de la konkurso.



## Komerca agado

*Kiel sciante, AEU celas uzigi Esperanton en komercaj kaj ekonomiaj rondoj. Tiurilate, ni sendis informojn al diversaj homoj, inter ili al la revuo Eventoj. Jen resumo:*

Lastatempe, AEU kontaktis Komercon Ĉambro de Malago kaj havigis al ĝi raporteton pri entreprenoj (kaj ties agadoj) situantaj en Ĉinio, Ĉeĥio, Ukraino, Madagaskaro, k.a. Nia celo estas havigi al la hispanoj la plej akuratajn kaj fidindajn informojn (Esperante kaj hispane) pri alilandaj komercaj, industriaj, k.a., firmaoj.

Kompreneble nia asocio nur aktivas por nia internacia lingvo. Tamen, kaj ĝuste pro tio, ĝi iniciatas kaj plenumas ekstermovadajn agadojn, kiel ĉi tiun, favorajn al la rekono kaj aplikado de Esperanto fare de neesperantistoj. Ni estas certaj ke de tio dependas grandparte ĝia estonto. Tial ni petegas alilandajn samideanojn, ke ili kolektu la plej interesajn informojn pri la agado de entreprenoj funkciaj je internacia nivelo en siaj respondaj landoj kaj sendu ilin al:

☐ Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝtkesto 864

E-29080 Malago

Hispanio

Ni publikigos ilin senpage en nia trimonata revuo *Gazeto Andaluzia* kaj, ankaŭ senpage estos havigataj al Komerca Ĉambro de Malago, por ke ĝi aperigu ilin en sia perioda publikaĵo *Promoción de Comercio Exterior, Ofertas y Demandas de Productos* (Iniciato de Ekstera Komercio, Ofertoj kaj Demandoj de Produktoj).

*La Estraro de AEU petas al ĉiuj membroj, ke ili same faru, kaj sendu ĉiujn informojn tiel peritajn al nia adreso.* □



Andaluzia Esperanto Unuiĝo kunlaboris kun Portugala Esperanto Asocio traduki kaj adapti al la hispana ĝia *Komputila Esperanto—Kurso*. La historieto de ĉi tiu programo vojaĝis almenaŭ tra tri landoj. La praoriginalo estas usona, programita de Todd Moody. PEA ekhavis ĝin en 1989 kaj en tiujara somero ili ekadaptis la lecionojn al la portugala lingvo kaj tute reprogramis ĉion (do temas pri iel nova programo).

En 1994 ĝin ricevis la redaktoro de AEU, kiu tradukis kaj adaptis ĝin hispanlingven. La programo funkcias per ĉiaj PC-kongruaj komputiloj, eĉ per

*(Daŭras en la venonta paĝo)*



## Sed, kio estas Esperanto?

Ĉu estas nur lingvo? Esence jes, unuamomente nur temas pri gramatikaĵo. Tamen estas sciate ke la lingvoj naskiĝis por komuniki enloĝantojn de sama gento; kontraŭe, Esperanto aperis, aŭ estis kreata de menso, por unuigi la tutan mondon. Sed, ĉu la mondo ne estas hodiaŭ nur granda vilaĝo? Tiel, Esperanto povus esti nur lingvo, kvankam ja lingvo nobela, altspirita, ĉar ĝi ne estas nur parolata, sed samtempe amata, enriĉigata kaj disvastigata, kvazaŭ ideo aŭ kredo.

Do, ĉu ĝi estas nur ideo? Praktike jes, ĉar ĝi estas io kio troviĝas en nia spirito, kvazaŭ deziro por interkomuniki la ulojn de ĉiuj landoj kaj ĉiuj rasoj. Tamen ĝi temas pri ideo malsimila al la nuntempaj ideologioj, ĉar komence ĝi postulas ion malfacile: "paroli *aliamaniere*", kaj tio povas esti granda laboro, kvazaŭ viv-stilo.

Tiam, ĉu ĝi estas maniero vivi? Verŝajne jes, en ĉiu lando, en preskaŭ ĉiu urbo vi trovos izolitan personon aŭ malgrandan grupeton kiu rigardas la mondon el malsimila vidpunkto, pli proksime. Sed ĝi ne estas ununura viv-stilo, ĉar ekzistas tiom da esperantoj kiom esperantistoj kaj malgraŭ ĉi diverseco, sendube etosas la solidareco inter la parolantoj.



Do, ĉu ĝi estas solidareca asocio, kiel *Greenpeace* aŭ Senlimaj Kuracistoj? Jes, kaj samtempe ne! Esperanto estas plena je grandegaj izoluloj: verkistoj, propagandistoj, laboristoj, kiuj kutime estas pli gravaj por la lingvo ol la plej nombra asocio. Eble tiu estas la ensorĉo de Esperanto kaj tio kio igas ĝin preskaŭ ne-difinebla. Esperanto, kiel asertis Zamenhof mem, estos tio, kio volos ĉiu esperantisto, do ni konstruas ĝin laŭ nia propra volo en ĉiu momento.



Sed, kio estas Esperanto? Ni respondu laŭ propra volo, ĉar por kiu ajn ĝi estas io malsimila.

K.A.




*(Daŭrigo de la paĝo 20)*

tre malnovaj, ne tro potencaj. Tial, oni limigis ĝian grafikan aspekton. Ĝi konsistas el multaj unuekranaj lecionoj, kiuj klarigas po unu gramatika ero kaj metas kontrolan demandon. Oni ne bezonas muson , ĉio fariĝas per klavaro . La programo havigas multajn informojn pri Esperanto, ĝiaj historio, prononco, vortaro...

*Komputila Esperanto—Kurso* haveblas ĉe la redaktoro de *Gazeto Andaluzia*, kontraŭ 1000 pesetojn. Indiku kian diskon vi volas.  



## Krucvortenigmo



### HORIZONTALE

1. Kovras la kapon de homoj kaj la korpon de mamuloj.
5. Fera ilo, uzata por ion teni, eltiri aŭ tranĉi.
11. Kostumon portatan de la membroj de unu sama korpo.
12. Sufikso.
13. Prefikso.
14. Movad' kiu difundas E-on en Japanio.
16. Rilatan al la sanktaj bildoj de la ortodoksuloj.
19. Sekse ami.
21. Malantaŭa parto de la mano (adv).
22. Prapatron de ĉiuj homoj.
23. Du vokaloj.
24. Part' de la okulglobo.
26. Malstreĉita, malkompakta (neol.)

### VERTIKALE

1. Entenanta ian kvanton da likvo aŭ vaporo.
2. Sufikso.
3. Senindulge sever'.
4. Ago de armeo, per kiu ĝi celas detru la malamikon.
5. Sur ki' sidas reĝoj?
6. Inklino al io.
7. Konstante migras de unu loko al alia. (Sen finaĵo)
8. Io ne normala, ekster la ĝenerala regulo.
9. Artikolo.
10. Kutima, ĉiutaga: ne diferencanta el la plimulto.
15. Sufikso: en kirurgio, ilo per kiu oni incizas organon.
17. Alianco, esp. politika.
18. Rilata al iu spirebla gaso.



27. Ujo, kie oni lavas sin (en banĉambroj).
29. Sufikso.
30. Pli ol cento.
31. Mallonga poem', en kiu dialogas paŝtistoj.
34. Kvalite.
35. Prefikso.
36. Du vokaloj.
38. Mallarĝa boato.
39. Lingv' de la samideanaro.
43. Ĉefa arteri' (komenciĝas ĉe la koro).
45. Flaveca tero, uzata kiel pigmento por farboj.
46. Pli ol unu.
47. La ...n de Kolumbo.
48. Aŭdebla aervibrad'.
20. Nomo de virino.
22. Reĝ' Hinda kiu konvertiĝis al budismo (273 a.K.)
25. Sovaĝan, almtontan kapron.
28. Muzikaĵo, kun vigla kaj gaja movado.
30. Prefikso signifanta miliono (ofte uzita pri komputiloj).
32. Patr' de Odiseo.
33. Rilata al ambaŭ seksoj.
35. Vokalo, dufoje.
37. Oscilo de la supraĵo de la maro.
40. Poŝkesto.
41. Greka litero.
42. Pez-unu' (mil kilogramoj).
44. Televido.



Denove Krucvortenigmo por vi! Ni ricevis la peton, ke nia enigmo ĉiam estu «eduka». Ni provis verki malfacilan enigmon, kaj inkludis, krom facilaj difinoj, iujn historiajn datumojn kaj aliajn malfacilaĵojn.


Kiel kutime, inter la solvintoj la redakcio lotumos premion: diskon de la esperantista muzikisto *Solo*. La solvoj (korektaj, espereble) atingu la redaktoron (p.k. 5184, 29080 Malago) antaŭ la 15a de aŭgusto.

Rilate la pasintnumeran enigmon, jen la solvo:

Gajnis premion nian samideanon César de Mosteyrín, de Segovio.

Gratulon al la gajninto... la ceteraj eklaboru! Nia poŝkesto atendas viajn leterojn.

□





## Esperanto Aplikata

Bonkvalita ligno kaj lignaj produktaĵoj el norda Eŭropo, la Baltaj Respublikoj kaj Ruslando. Ni, la firmao STUNGUVA el Litovio, havas kontaktojn kun klientoj en Nederlando, Belgio, Hispanio. Bonvolu diri al ni viajn dezirojn kaj volonte faros specialan oferton por vi. reprezentanto por Germanio, Eŭropa Unio kaj Usono: s-ro Christian Papenmeier, Kirchspieler Seite 35, D-61279 Grävenwiesbach-Laubach, Germanio. Fakso: 0049 6171 53879.

Turisma servo de Ruslanda Esperanto-Centro invitas al kunlaboro proponante itinerojn tra Ruslando. Vi povas aliĝi al la jam anoncitaj grupoj aŭ proponi viajn datojn. Vojaĝkalendaro haveblas ĉe TURISMA SERVO DE RUSLANDA ESPERANTO-CENTRO, Jekaterinburg-77, p.k. 67, RU-620077, Ruslando. Tel: (3432)224501 (13h00-17h00 laŭ MET lunde, merkrede, vendrede). Telefakso: (3432)518647 Esperanto 224501. Pliaj informoj haveblas ankaŭ ĉe AEU, pk 864, 29080 Malago, Hispanio.

Mia kuzino baldaŭ naskos bebon, sed la familio estas malriĉa. Se vi povus kolekti uzitajn, sed bonstatajn vestaĵojn kaj sendus al mi, mi estus

tre tre danka. Eventuale mi povas simbole rekompenci per belaj telefonkartoĵoj, poŝtmarkoj uzitaj. Adreso: Bajáki Imre, Kiskunfélegyhaza, Dr. Holló L. u. 61, Hungario-6100.

AZAHAR, herbovendejo kaj natura kosmetiko. Avenida San Sebastián 3, ejo 5, zona Eugenio Gross, Málaga. Horaro: 9-14 kaj 17-21.

Ĉu vi povus trovi al mi laboron en via urbo, iun pli elegantan ol stratpurigado aŭ simila? Mi ne parolas alian lingvon krom E-o kaj hungara, sed surloke eble kun via helpo mi eble povus rapide lerni la lokan lingvon. Adreso: Bajáki Imre, Kiskunfélegyhaza, Dr. Holló L. u. 61, Hungario-6100.

Privataj klasoj de latino. José Gil Martín, Corregidor C. Garafa, bl. 11 bis, 5º D, Apartado 650, 29080 Malago. Tel. 233 74 86.

Privataj klasoj de la japana lingvo. Adreso: Vicente Ramírez Párraga, Avenida Barcelona 38-8º A, 29009 Malago. Tel: 227 07 01.

Interŝanĝo de poŝtmarkoj hispanaj kaj alilandaj. J. Manuel Alonso de Arco, Alameda de Capuchinos 8, 5ºB, 29014 Malago, Hispanio.

Moneroj, biletoj, horloĝoj, libroj.





Kolektoj kaj antikvaĵoj. Sendi leteron kun datumoj kaj fotoj. LA KAVERNO, Arquitecto Emilio Piñero, 7, 30007 Murcia. Tel: 968-233775.

Firmao KARAJANI, Rr Punetoret e Rilindjes, P.2 A.63, Tirana, fakso +355-42-23972, sin okupas precipe pri aĉeto kaj vendo de koloraj metaloj (teknologiaj restaĵoj aŭ puraj). Ĝi petas vendi aŭ aĉeti je favoraj prezoj kvanton ĝis kelkaj ŝarĝaŭtoj monate. Krome, ĝi peradas albanojn kaj fremdulojn por trovi en Albanio ejojn, grundojn, diversajn informojn.

S-ro Tu Jian-yi, vic-sekretario de Sichuaa provinco E-asocio, pretas helpi en eksportaj kaj komercaj aferoj. Adreso: P.O.B. 87, CN-610011 Chengdu, Sichuan. Tel: 0086-28-6749429 (hejme), 6755505 (oficeje).

Perado por komerco en medikamentoj kaj medicina ilaro. S-ino Maria SROGOSZ, str. Mieszczanska 3 m 18, PL-93 322 Łódź, tel. 042-462709.

Lignaĵaj varoj (framoj por fenestroj kaj pordoj, pinia oleo kaj lako); komputado kaj programado (precipe instruaj programoj por fremdaj lingvoj); turismo en sovaĝa naturo; eldonoj; informa banko pri rusaj inventoj kaj teknologio. Adreso: s-ro Andreo Bochkarev,

Oktjabrskaja 61-1, RU-636842 Komsomolsk Tomskaja obl.

Aĉeto de viando (ĉefe kokida). Vendo de lignaĵo, cemento, glaso, torfo. Investoj en novteknologia (oranĝeria) agrikulturo. Privata firmo disponas pri necesaj devizoj, propraj transportiloj kaj subteno de municipalaj estroj. Anatolo Sidorov, str. Dimitrova 24-A-21, RU-241037 Brjansk.

Afrikaj produktoj, i.a. pentraĵoj, artaĵoj, ĉiuspecaj reptiloj, tradiciaj vestaĵoj, aĉeto de malnovaj aŭtomobiloj por revendo. S-ro Patrice Kossivi ASSIOBO, B.P. 60614, Lomé.

D-ro Boris Kolker, 1300 Superior Avenue, apt. 2109, Cleveland OH-44114 Usono, estas interesata kunlabori kun esperantistoj kiuj okupiĝas pri internacia negocado.

Importo, eksporto, produktado (i.a. teo, ledaĵoj), diversaj servoj. Adreso: s-ro Liu Xiaozhe, 32 North Youhao Road, CN-830000 Urumoi, Ĉinio. Tel: +86-991-4841216. Fakso: 4841546.

Listo (en la franca, germana, angla kaj Esperanto) de neokupitaj profesiaj ejoj en la regiono de Colmar kaj centra Elzaco estas havebla perpoŝte per simpla peto ĉe la Komerco- kaj Industri-Ĉambro. Adreso: CCI Info, M Frank, 1 Place



de la Gare, F-68000 Colmar, Francio. Fakso: +33-89-202021.

TAKE-Esperanto (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistoj), kiu profesie surmerkatigis pere de Esperanto jam plurajn vinspecoj el Francio, nun ekokupiĝis pri novaj produktoj de biologia agrikulturo. Se vi interesiĝas pri tiaj plantoj (kratago, bazilio, drakunkolo, ktp., entute 20 specoj) petu oferton (en Esperanto) rekte de la distribuanto: Ferme du Kalblin, MC et S Wurtz, F-68240 Freland, Francio.

Komerce pretigita tekstoprilaborilo por Esperanto sur IBM-kongruaj komputiloj ekde Vindozo 3.0. Helpsisitemo kaj manipulado pure en Esperanto. Enkonduka prezo 200 germanaj markoj. Adreso: Professional Consulting, S-ro PEJNO Simono, Am Fülgarten 4, D-61250 Usingen. Tel: +49-6081-66722, Fakso: +49-6081-3955.

Jam dum jaroj okazis al kompanioj, kaj nun okazas al privatuloj. Niĝerianoj skribas leterojn en kiuj ili faras tre allogan proponon por facilege riĉiĝi sen ia ajn laboro. Temas pri trompaĵo kaj oni neniam respondu tiajn leterojn. (*Eventoj*, 1/dec. 1994).

Survoje al unuiĝo, la popoloj devas konservi bonkvaliton kaj diversecon de la natura kaj kultura vivmedio de la homaro. Tion celas projekto

*Lingvo-Kulturo-Ekologio*, efektivigata de la samnoma Centro de la Akademio de Nova Pensado (ANP), sub aŭspicio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) de San-Marino kaj Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo (Monda Kunagado) kiel ilia kontribuo al la Monda Jardeko por Kultura Evoluigo (1988-1977) de UN/UNESKO kaj al Eŭropa Naturprotekta Jaro 1995. Forumo *Etno kaj naturo* 1995 (ETNA-95) estas la dua granda evento de la projekto post la rusa AIS-sesio. Informoj: Internacia Komitato ETNA-95; OUZP, Popradské nábrezie 16, 058 01 Poprad, Slovakio.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo proponas al vi:

—*Pandemonio*, aro da rakontoj de junaj hispanaj aŭtoroj (500 pesetoj)  
—*Solo*. Disko de malaga esperantista muzikisto, ±25 minuta (500 pesetoj).

Plus sendokostoj. AEU, p.k. 864, 29080 Malago.


Ĉi tie oni povus legi VIAN anoncon. SENPAGE. Aŭ tiun de viaj amikoj, najbaroj... Simple skribu leteron al ni, kaj vian anonceton aperos en nia venonta *Gazeto Andaluzia*.

**INVITO**  
**AL 3a INTERNACIA KULTURA KAJ**  
**TURISMA ESPERANTO - SEMAJNO**

4a - 11a de novembro de 1995

**SALOU**

**KATALUNIO HISPANIO**



Sub aŭspicio de HISPANA  
ESPERANTO-MUZEO

## D O K U M E N T O J D E L I G O D E N A C I O J

### Tria Asembleo

Plenumante unu el la decidoj de la Dua Asembleo, la Sekretariato verkis ampleksan raporton titolitan ESPERANTO KIEL INTERNACIA HELPA LINGVO, kiu originale konsistis el kvin partoj.

En aŭtuno 1922, la Kvina Komitato pritraktis la raporton. La ĉefaj oponentoj estis:

F-ino Forchhammer (Danlando), s-ro Rio Branco (Brazilo) kiu diris, ke Esperanto estas "lingvo de mizeruloj kaj komunistoj" kaj la franca senatano G. Reynald kiu ricevis instrukciojn malaprobi kian ajn "mondlingvon" escepte la franca.

G. Reynald proponis, ke oni transdonu la aferon al la Komisiono pri Intelekta Kunlaborado. La delegitoj de Finnlando, Persio, Ĉinio, Bulgario kaj Japanio timis, ke la celo de Reynald estas enterigi la aferon. Dum tri tagoj oni diskutis eĉ pasie.

Jen esperante la tekston, kiun la Kvina Komitato prezentis al la Tria Asembleo.

1.- Ke la Raporto de la Sekretariato pri Esperanto kiel Helpa Internacia Lingvo estu adoptita, sed kun la sekvantaj amendoj:

a) Ke la korektoj komunikitaj de la Brita Delegacio estu faritaj kaj ke la 5a Ĉapitro de la Raporto estu ellasita.

b) Ke al la Raporto estu aldonita anekso konsistanta el la tuta mallonga kaj senpartieca Raporto de la Pariza Komerca Ĉambro de la 9a februaro 1921, el kiu nur kelkaj partoj estis cititaj.

c) Ke la rezolucioj akceptitaj de la Komitato estu aldonitaj al la Raporto.

2) Ke la demandoj rilatantaj al la instruado de Esperanto estu transdonitaj al la Komisiono pri Intelekta Kunlaborado, por ke tiu Komisiono povu doni sian opinion pri la diversaj aspektoj de la problemo de helpa internacia lingvo.

La 21an de septembro 1922, la Tria Asembleo akceptis la Raporton de la Kvina Komitato kaj tiamaniere oficialiĝis la Raporto de la Sekretariato, sed kun iuj amendoj.

000  
-----0000000-----  
000